


JANUARO
FEBRUARO

1978

110

(I)

hejs
hejs
hejs



TEJO
KI

10 HES



ENHAVO

NOVA STATUTO, DENOVE	3
PROJEKTO DE STATUTO POR HEJS	4
FAVORE AL LA BIRDARO	8
UNU MINORA LINGVO: LA FRIULA	9
KONTRAŬ LA NEŬTRONBOMBO, PROTESTU!	11
LA ANGLA LINGVO: IO PLI OL LINGVO	12
KOTIZOJ POR 1978	13
"SERVAS" MALFERMITAJ PORDOJ EN LA TUTA MONDO	14
PARTOPRENINDA, 34a IJK	16
INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ	17
LA ĈASO	18
TRA LA MONDO... PASPORTA SERVO DE TEJO .	20

HEJS - Januaro-Februaro 1978

N-ro 110 (1) - 20a Jaro

INTERNA BULTENO ORGANO DE HEJS

(HISPANA ESPERANTISTA JUNULARA SOCIETO)

Junulara Sekcio de HEF - Landa Sekcio de TEJO

Gral. Mola, 99, 1r - Apartat 407

SABADELL (Barcelona) - Hispanio

Konto n-ro 15049-56 en Banc de Sabadell

Prezidanto: Ludoviko de Yzaguirre

Ĉefredaktoro: Òscar Puig i Cánovas

Presita en "L'Eina" - Dip. Legal. B.6519-1977

PRI LA SUBSKRIBITAJ ARTIKOLOJ, RESPONDECAS

NUR LA AŬTORO. KAJ PRI ĈIO ALIA, RESPONDECAS

LA ESTRARO KAJ LA REDAKCIO DE HEJS.

©HEJS 1978

NOVA STATUTO, DENOVE

Jen definitiva projekto. Ĝi alvenas iom malfrue en viajn manojn. Ja ni scias; sed ĝi alvenis! Ĝi estas rezulto de la kunfandiĝo de la unua projekto de ni pretigita kun aro da sugestoj kiujn tri samidanoj sendis al ni kaj ni akceptis unuanime. Tiuj ĉi kunlaborantoj estis s-anoj Altuna, el Bilbao, Puig, el Sabadell kaj Ruiz, el Barcelono. Al ili ni estas dankemaj.

Nun ni opinias, ke ni jam povas preskaŭ diri, ke ni posedas novan Statuton, ke ni devas ekapliki ĝin. Ja tiel estas, se ni interpretas la ĝeneralan nereagon al la unua projekto kiel ĝia aprobo. Sed, kompreneble ni ne rajtas agi laŭ nia interpreto de la realo, sed laŭ faktoj pruvantaj la (mal)pravecon de nia interpreto. Kaj tiuj faktoj devas esti, en tiu ĉi okazo, voĉdono de la membraro. Do, ni proponas al vi voĉdonon pri la Statuto. Sed por ĝi vi bezonas koni la ŝanĝojn en la teksto pri kiuj mi skribis en la komenco. Jen ili:

Artikolo 5 (aldono): kaj povas esti ŝanĝata.

Artikolo 11.2. bis (aldono). Izoluloj neapartenantaj al asocioj aŭ organizoj aliĝintaj al HEJS rajtas elekti komitatanojn laŭ la proporcioj difinitaj en artikolo 11.2.

Artikolo 11.4. (aldono) Ĉiuj komitatanoj estas ekselekteblaj per la sama proceduro per kiu ili estis elektitaj.

Artikolo 20. bis (aldono) Okaze de dissolvo de HEJS, ĝia mono apartenas al HEF kaj ĉio restanta al TEJO.

Ĉar la estraro akceptis tiujn plibonigojn, ili apartenas al la projekto definitiva kaj sekve ni petas de vi ĉu vi aprobas, malaprobas aŭ sindetenas pri ĝi.

Kompreneble, nur rajtas voĉdoni tiuj membroj, kiuj ankoraŭ ne preteriris la aĝolimon de 30 jaroj. Bonvolu nepre indiki la naskiĝdaton. Estas ankaŭ kondiĉo nepre esti paginta la lastan kotizon de ni enspezitan, tiun de 1977. Lasta kondiĉo por valida voĉdono estas sendi ĝin antaŭ la 31a de VIII de 1978.

Estas grave, ke ĉiuj voĉrajtaj membroj balotu, ĉar se ni ne havus tian Statuton, daŭre restus la problemoj jenaj:

- ni ne povus mem elekti la estraron.
- la kluboj kaj grupoj de junaj esperantistoj ne estus reprezentitaj antaŭ la estraro.
- la agado de la estraro restus daŭre nerilata al tiu de la membraro.

Do ni faras ĝeneralan alvokon al voĉdonado kaj eĉ al ekapliko de la novaj kriterioj fontantaj el la Statuto: ekzemple, la grupoj komencu jam pripensi pri eblaj reprezentantoj en la komitato, eblaj proponoj al ĝi, ktp. Sed NEPRE VOĈDONU.

Ludoviko de Yzaquirre
Prezidanto de HEJS

Ni republikigas ĉi-sube la projekton de Statuto por HEJS, kiun jam aperis en la pasinta numero de nia revuo, por ke ĉiu membro havu la eblecon de nove tralegi ĝin, sen devi serĉi la antaŭan numeron, eble perdita, ne alveninta, eluzita...
 Ne forgesu aldoni la amendojn kiuj troviĝas en paĝo 3.

PROJEKTO DE STATUTO POR HISPANA ESPERANTISTA JUNULARA SOCIETO

I.- GENERALAJ PRINCIPOJ

- 1.- Nomo. La nomo de la organizo estas Hispana Esperantista Junulara Societo, mallongigite, HEJS.
- 2.- Statuso. HEJS estas junulara sekcio de Hispana Esperanto-Federacio (HEF) kaj landa sekcio de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO).
 2.2. La estraranoj de HEJS estas en daŭra kontakto kun tiuj de HEF kaj TEJO per reciproka komunikado.
- 3.- Konsisto. HEJS konsistas el membriĝintaj asocioj kaj individuaj membroj.
- 4.- Celoj. 4.1. La celo de HEJS estas disvastigo kaj plifortigo de la ideo de lingvo internacia kaj, pli konkrete, de Esperanto, precipe en junularaj medioj.
 4.2. Rimendoj: 4.2.1. Informado pri la internacia lingvo. 4.2.2. Praktika utiligo de la internacia lingvo je la servo de la junularo. 4.2.3. Okazigo de renkontiĝoj. 4.2.4. Preparado de la membraro al aktiva partopreno en la ĝenerala Esperanto-movado.
 4.3. HEJS konsideras bazon de sia agado la aktivan strebado al respekto kaj plenumo de la Homaj Rajtoj kaj de la Rajtoj de la Popoloj.
- 5.- Sidejo. HEJS sidejas en Sabadell, strato General Mola, 99.
- 6.- Lingvo(j). La oficiala lingvo de HEJS estas la lingvo Esperanto, tial ĝi estas difinita per sia fundamento kaj per sia verkaro. Labora lingvo povas esti kiu ajn.

II.- MEMBRICO

7.- Membrokategorioj.

- 7.1. HEJS havas asociajn kaj individuajn membrojn, kiel ankaŭ honorajn membrojn, honorajn prezidantojn kaj subtenantojn.
- 7.2. Asociaj kaj individuaj membroj povas esti gejunuloj, ne atingintaj la aĝon de tridek jaroj. Escepte, la membroj de la gvidorganoj de HEJS povas esti maksimume du jaroj pli aĝaj. La aĝo de honoraj membroj, honoraj prezidantoj kaj subtenanto ne estas limigita.
- 7.3. Asociaj membroj estas la membroj de la aliĝintaj Asocioj aŭ Organizoj, konformaj al la aĝolimo difinita en la artikolo 7.2., kaj por kiuj la koncerna asocio aŭ organizo pagas la specifan jaran kotizon.
- 7.4. Individuaj membroj estas tiuj, kiuj apartenas al neniu asocio aŭ organizo aliĝinta al HEJS.

7.5. Kiel honoraj membroj povas esti elektitaj personoj, kiuj faris gravajn servojn al la junulara Esperanto-movado. Kiel honoraj prezidantoj povas esti elektitaj nur personoj, kiuj, krome, havis eksterordinarajn meritojn por HEJS.

8.- Asocioj aŭ Organizoj aliĝas al HEJS post akcepto de ties Komitato.

9.- Eksigo kaj eksigo.

9.1. Pri la eksigo kaj eksigo de individuaj membroj, honoraj membroj kaj honoraj prezidantoj, kompetentas la Komitato.

9.2. La eksigo de la aliĝintaj asocioj kaj organizoj devas esti skribe deklarita. Ĝi validas de la fino de la administra jaro.

9.3. Aliĝinta asocio aŭ organizo, kiu malgraŭ skriba averto ne pagis la koncernan kotizon, estas konsiderata kiel eksiginta.

9.4. Membroj kaj aliĝintaj asocioj aŭ organizoj kiu evidente kontraŭlaboras la celon de HEJS aŭ nekontentige plenumas siajn devojn al la organizo, povas esti eksigitaj laŭ decido de la Komitato.

10.- Subtenantoj.

10.1. Subtenantoj estas organizoj aŭ personoj, kiuj, simpatiante al HEJS, finance helpas ĝin.

10.2. La Komitato de HEJS akceptas subtenantoj, por kiuj ĝi fiksas specialan kotizon.

III.- ORGANAJ

11.- Komitato

11.1. La supera instanco de HEJS estas la Komitato kiu konsistas el:

1.1. Komitatanoj A, reprezentantaj la aliĝintajn asociojn aŭ organizojn, elektataj de ili.

1.2. Komitatanoj B, elektataj far la tuta Komitato, en maksimuma nombro de unu kvarono de la komitatanoj A.

11.2. Ĉiu aliĝinta asocio aŭ organizo kun almenaŭ 5 aktivaj membroj rajtas al komitatanoj laŭ jena proporcio:

kvin ĝis dek unu unu komitatano

dek tri ĝis dudek du komitatanoj

dudek unu ĝis tridek tri komitatanoj

tridek unu aŭ pli kvar komitatanoj.

11.3. Por certigi al HEJS la kurlaboron de spertuloj, la Komitato povas elekti komitatanojn B, ĝis maksimuma nombro de kvarono de la komitatanoj A, post certigo de ilia preteco kunlabori efike la agadon.

11.4. Ĉiuj komitatanoj devas esti membroj de HEJS. Ĉiuj komitatanoj estas samrajtaj kaj reelekteblaj.

11.5. Komitatano A, kiu ne povas partopreni kunsidon de la Komitato, devas nomi anstataŭanton, skribe aprobitan de la koncerna asocio. Kaj la anstataŭita komitatano, kaj la anstataŭanto devas esti membroj de HEJS; la anstataŭanto havas dum la koncerna kunsido la samajn rajtojn kiel ĉiu alia komitatano. Komitatano B ne estas anstataŭebla.

11.6. La Komitato:

11.6.1. Elektas prezidanton, unu aŭ du vicprezidantojn, ĝeneralan sekretariojn, estraron pri financoj, kaj laŭ necesoj, pliajn estraranojn;

11.6.2. Rajtas elekti honorajn membrojn kaj honorajn prezidantojn;

11.6.3. Difinas la ĝeneralan agadon de HEJS.

11.6.4. Decidas pri la aliĝo kaj eksigo de asocioj;

11.6.5. Decidas pri regularoj;

- 11.6.6. Disponas pri la monsumo, pri kiu ĝi rajtas memstare decidi;
- 11.6.7. Diskutas kaj aprobas la jarbilancon kaj la buĝeton.
- 11.6.8. Akceptas subtenantojn, kiaj difinitaj en artikolo dek, kaj fiksas iliajn kotizojn.
- 11.6.9. Decidas pri la agado de la estraro.
- 11.6.10. Decidas pri la aferoj ne rezervitaj al aliaj organoj, rajtas decidi en ĉiuj aferoj pri kiuj kompetentas la estraro.

12.- Estraro

- 12.1. La estraro konsistas el membroj difinitaj en artikolo 11.6.1., kaj estas elektata ĉiun jaron.
 - 12.2. La estraro:
 - 12.2.1. Plenumas la decidojn de la Komitato.
 - 12.2.2. Nomas la redaktoron de la bulteno de la organizo.
 - 12.2.3. Decidas pri la loko kaj la tempo de la kunvenoj kaj renkontiĝoj.
 - 12.2.4. Kreas novajn servojn.
 - 12.2.5. Respondas pri financoj de HEJS antaŭ la Komitato.
 - 12.3. La prezidanto reprezentas HEJS-n kaj subskribas kun la ĝenerala sekretario la ĉefajn dokumentojn, prezidas la komitaton, la estraron kaj la kunvenojn de HEJS.
 - 12.4. La vicprezidantoj, laŭnecese anstataŭas la prezidanton.
 - 12.5. La ĝenerala sekretario zorgas pri la efektiviĝo de la decidoj de la komitato kaj de la estraro, kunmetas la jaran raporton pri la laboro de HEJS.
 - 12.6. La estrarano pri financoj administras la monaferojn de HEJS.
 - 12.7. Ĉiuj estraranoj plenumas laŭbezone komisiitajn taskojn.
- 13.- La redaktoro plenumas siajn redaktajn taskojn laŭ la ĝenerala gvidlinio difinita de la Komitato kaj respondecas al la Estraro.
- 14.- Komisionoj kaj komisiitoj. En la kadro de sia kompetenteco, la Komitato aŭ la Estraro povas elekti specialajn komisionojn aŭ komisiitojn por esplori iujn problemojn aŭ por plenumi difinitajn taskojn. Post la plenumo de la tasko, ĉiu komisiono aŭ komisiito devas skribi raportojn al la elektinta organo.
- 15.- Labormaniero de la organoj.
- 15.1. La Komitato kaj la Estraro kunvenas almenaŭ unu fojon jare, laŭbezone.
 - 15.2. En la voĉdonoj, validas la plimulto de la voĉdonintoj. Okaze de voĉegaleco decidas la prezidanto de la koncerna organo. Decidoj, kiujn partoprenis malpli ol duono de la rajtintoj, devas esti submetita al skriba voĉdono, en kiu sufiĉas la plimulto de la voĉdonantoj. Funkciulo sin detenas de voĉdono pri aferoj, kiuj koncernas lin persone.

IV.- FINANCOJ

16.- Enspezoj. Ĝia utiligo.

- 16.1. La enspezoj de HEJS konsistas el:
 - 16.1.1. Membrokotizoj.
 - 16.1.2. Monprofito de la agadoj de la organizo.
 - 16.1.3. Donacoj, heredaĵoj kaj subvencioj.
- 16.2. La enspezoj estas utiligataj por kovri unue la eŭbuĝetitajn elspezojn kaj la administradon de HEJS.

- GENERALA VOĈDONADO

7.- Okazigo

17.1. Ĝi okazas:

- 17.1.1. Se la komitato, aŭ, okaze de urĝeco, la estraro, tion decidis.
- 17.1.2. Se aliĝintaj asocioj aŭ organizoj reprezentantaj kvaronon de la membraro ĝin postulas per sia skriba subskribo, en tempolimo de tri monatoj, kalkulita de la unua ĝis la lasta skriba postulo.
- 17.1.3. Se kvarono de la individuaj membroj ĝin postulas per sia skriba subskribo, en tempolimo de tri monatoj kalkulita de la unua ĝis la lasta skriba postulo.

17.2. La ĝenerala sekretario ĝin arangas plej malfrue du monatojn post ricevo de sufiĉa nombro da subskriboj.

17.3. Tiu voĉdono esprimas sin pri demandoj submetita de la instanco, kiu postulis la ĝeneralan voĉdonon.

18.- Kalkulo de voĉoj

- 18.1. Ĉiu aliĝinta asocio aŭ organizo havas nombron da voĉoj egalan al la nombro de la asociaj membroj, por kiuj la kotizo jam estas pagita je la dato de arangado de la voĉdono.
- 18.2. La individuaj membroj voĉdonas individue, ĉiu membro rajtas al unu voĉo, kiu ne povas esti delegita al alia persono nek organizo.
- 18.3. En la voĉdono validas la plimulto de la esprimitaj voĉoj. Por ŝanĝi la statuton aŭ dissolvi la organizon, necesas du trionoj de la esprimitaj voĉoj, kondiĉe ke tiuj voĉoj reprezentu minimume la duonon de la membraro.

19.- Kontrolo. La ĝenerala voĉdono estas skriba, kaj la voĉoj estas kalkulitaj 45 tagoj post la forsendo de la voĉdonoj. La voĉdonoilojn kalkulas persono proponita de la instanco, kiu postulis la ĝeneralan voĉdonon, en ĉeesto de tri membroj nomitaj de la komitato de HEJS. Ĉiu kontrolinto skribe certigas la ĝustecon de la proceduro.

VI.- ŜANĜO DE LA STATUTO

20.- La komitato de HEJS kompetentas pri ŝanĝo de ĉi-statuto. Pri la statutsanĝoj, la ĝenerala sekretario de HEJS informas la estrarojn de HEF kaj de TEJO, kiuj plej malfrue dum la sekvonta kunveno komunikas tion al sia komitato. Statutsanĝoj, tuzantaj ankaŭ la statutojn de HEF aŭ de TEJO validas nur post la aprobo de ilia kompetenta organo kiu decida pri tio, plej malfrue du monatoj post la decido de la komitato de HEJS.

21.- Provizoriaj reguloj. Per la akcepto de tiu ĉi statuto ĉesas validi ĉiuj reguloj kiuj kontraŭas la principojn kaj regulojn de ĉi statuto.



APUD LA NIGRA MARO, PARTOPRENU
LA 63an UNIVERSALAN KONGRESON
DE ESPERANTO, POST LA IJK EN
VELIKO TIRNOVO, KOMPREENBLE...

FAVORE AL LA BIRDARO

Dum la vintro, ni en Anglujo sopiras je la printempo, kiam la vetero iĝos pli varma, kaj ni revidos la florojn kaj aŭdos la birdkantojn. Kvankam ni vidas kelkajn birdojn dum la vintro, la plejparto foriras al pli varmaj landoj. Ni revidas ilin kun ĝojo, aŭskultas la kantojn kaj rigardas dum ili amindumas, konstruas la nestojn, kaj prizorgas la idojn. Tiel forta laboro! Ili estas tiel sindonemaj gepatroj, ili laboras senĉese de frua mateno ĝis krepusko. Mi ĝojas kiam ili sukcesas kaj ĝuas vidi la junulojn en niaj ĝardenoj kaj arbaroj, -fringoj, kardeloj, silvioj, merloj, turdoj, emberizoj, ktp. La rubeno estas aparte amata pro sia amikeco.

Ni bedaŭras kiam venas la aŭtuno kaj ili forflugas. La etaj flugiloj batalas kontraŭ la ventoj kaj pluvo trans la maro. Tre longa vojaĝo por - grandaj birdoj, ĝis la pli varmaj landoj, eĉ la Afriko.

Sed Ho ve! multaj ne revenos, kaj oni diras al ni ke ili finiĝas sur la budoj de viaj vendejoj (na ŭza vidaĝo al anglaj vizitantoj) mortigitaj per pafilo, eĉ kruele per ~~retoj~~ ŝmirkaptiloj, tromplogiloj. Tiom da sufero por tion da viando. Ni, al kiuj la birdoj estas amikoj, petegas al la sinjoroj ne mortigi la birdojn, kaj al la sinjorinoj ne aĉeti ilin aŭ kuiri ilin.

Esperantistoj estas bonkoraj, tial verŝajne vi mem jam ne faras tion.

Bone, sed bonvolu disvastigi la senton kaj petu al via registaro malpermesi la buĉadon. Instigi al viaj amikoj ke ili opiniu ke la aspekto de - birdo estas multe pli bela vivante sur arbo ol morta sur budo, kaj ke aŭdi la kanton donas pli da plezuron ol la sono de pafilo.

Tiamaniere, birdoj kaj homoj povos kunekzisti en amikeco, kaj la mondo estos pli bela por viaj in fanoj.

I.L. Shelton (Anglujo)

unu minoraj lingvoj: la friula

Estante italo (pli ĝuste: italino) mi ĉiam kredis, ke Esperanto estas mia dua lingvo, ĉar, kompreneble, mia unua, denaska, estas la itala. Sed nun mi ĵus rimarkis, ke mia konvinko estas erra, se veras la asertoj de la angla profesoro D.G. Gregor, kiu deklaras, ke "la italoj estas dulingvaj, kaj ilia dua lingvo estas la itala. Antaŭ ol studi la italan en la lernejo la duoninsulaj infanoj lernas el la gepatroj paroli la lokan dialekton, kiu vere estas la originala, denaska lingvo por la plejgranda plimulto de la italoj."

Kaj fakte Italujo estas vera kalejdoskopoda dialektoj, ofte tre malsimilaj unu de la alia.

Eĉ se la fenomeno de la dialekta diverseco estas daŭre malpliiganta, pro la kreskanta instruigo de la tuta popolo, tamen ankoraŭ nuntempe povas okazi, ekzemple, ke neinstruita siciliano nur kun tre granda peno sukcesas interkompreniĝi kun alia, same neinstruita loĝanto de norda Italujo.

La suprecititajn deklarojn de profesoro Gregor mi legis en la antaŭparolo de dika, kalalingva volumo titolita "Friulan language and Literature", eldonita en Malto de "The Oleander Press-Cambridge, New York" en 1975.

Nu, la nomon de profesoro D.B. Gregor mi estis jam aŭdinta, mi jam sciis (iom nebula, mi konfesas mian ignorantecon), ke li estas valora filologo, eseisto, literaturisto, en la angla kaj ankaŭ en Esperanto, ke li estas aparte konata en niaj literaturaj medioj pro lia mirinda traduko de la Sofokla "Reĝo Edipo kaj Antigona". Sed estis vera surprizo ekscii, ke li verkis tiom imponan libron pri la itala dialekto.

El la legado de tiu volumo mi eklernis (aĥ, la italaj lernejoj, kie oni instruas nenion pri tio!), ke la lingvo parolata en la nordorienta itala regiono nomata Friuli ("la furlana", laŭ la tieaj enloĝantoj) troviĝas en la paradoksa pozicio esti dialekto de Italio sen esti itala dialekto. Alimaniere dirite, la friula, kvankam parolata en itala regiono, ne apartenas al iu ajn dialektogrupo kaj nete diferencigas disde la gallo-itala lingvofamilio.

Diference de la aliaj, pli famaj "minoraj" lingvoj (t.e. lingvoj sen ŝtata teritorio, parolataj de minoritataj etnioj interne de ŝtatoj kun alia "oficiala" lingvo), kiel ekzemple la provenca, la vaska, la kataluna, la kimra k.a., la scienca studado de la friula lingvo komenciĝis sufiĉe malfrue, kaj nur en 1873 la fama lingvisto G.I. Ascoli ĝin analizis funde kaj malkovris ĝuste, ke la friula ne estas itala dialekto sed ke ĝi apartenas al tute aparte lingvo-grupo konsistanta el tri geografie disigitaj popolkolektivoj loĝantaj respektive en la friula regiono, en kelkaj malgrandaj valoj de la suda Tirolo kaj en la valo Engadino de kanto Grizono en Svislando. La gramatika kaj leksikaj karakteroj de tiuj tri malgrandaj lingvogrupoj prezentas nete rekonteblajn similecojn malgraŭ la distancoj kaj neligiteco. Ascoli nomis tiun lingvofamilion "ladina". Notindas, ke la plej okcidenta grupo de la ladina, tiu de Engadino (tie nomita "reto-romanĉa"), ekde 1973 estis agnoskita kiel la kvara oficiala lingvo de Svislando.

Post la studoj de Ascoli, Trombetti, Tagliavini kaj, fine, de profesoro Gregor, oni ne plu povas dubi, ke la tri enklavoj de la ladina lingvo konsistigas apartan, koheran idiomon en la hindeŭropa lingvofamilio, nome lingvogrupo karakterizita de tipe arkaikaj trajtoj evidentigantaj netajn spurojn el la latina kaj el la praitalaj - dialektoj.

Krom la gramatikajn kaj strukturajn ecojn de la friula, en la citita libro profesoro Gregor funde kaj kompetente analizas ankaŭ la aspektojn kaj la rimarkindan evoluadon de la literatura produktado de la friula ladino. Pere de multaj kaj perfekte tradukitaj ekzemploj li detaligas kaj aparte emfazas kelkajn tipajn ĝenrojn de la "furlana" baletro, kiuj nemal multe diskoniĝis ankaŭ ekster siaj regionaj limoj. Kaj sufiĉus nur menciigi la baladon "furlana", kiu fariĝis populara eŭropa danco, foje eĉ komparata al la "Lieder" de Heine. La originoj de tiu balado kuŝas en tre aktiva poezia metro nomita "villotta", nome - poemstrofo de kvar oksilabaj versoj, el kiuj la du malfortaj foje, la du fortaj ĉiam, rimas. La unuaj specimenoj de tiu "villotta" aperis en la 15-a jarcento kaj ties temoj estas ofte melankoliaj aŭ satiraj kaj kantas ĉefe pri amo aŭ morto.

Kroma surprizo por mi estis malkovri, ke profesoro Douglas B. Gregor ne nur funde studis la friulan kaj tradukis anglalingven - ĝiajn literaturajn provojn, sed ke li ankaŭ tre vaste tradukis ilin en Esperanto. Kaj, laŭ mia peto, li tre afable sendis al mi dikan ko lekton el tiuj, el kiuj mi plukis la sekvajn ekzemplojn:

Morti, jes: verdikt' de Dio
ke al ĉio venu fin';
sed terura la nescio,
kio transe trafos nin.

Ho la flustro de l'karulo,
kia dolĉa melodi'!
Samaj vortoj de aliaj
sonas ne kiel de li.

Volas esti ni senzorgaj,
kiel taŭgas al junul'.
Daŭre staros la preĝejo,
kiam ni jam estos Nul'.

Kiam mi petegis rozon,
ŝi rifuzis doni. Nu,
alflustrite "fianĉino"
tuj ŝi donis al mi du.

Kristina de'Giorgi
Como (Italio)

Kontraŭ la neŭtronbombo

Protestu!

50.000 personoj kolektiĝis la 6-an de aŭgusto en Hiroŝima por mani festacii okaze de la 32-a datreveno de la atombomba eksplodo okazinta laŭ ordono de prezidanto Truman.

La manifestaciintoj kuniĝis en la parko de la Paco, en kies mezo staras la cenotafo konstruita memore al la centoj de miloj da viktimoj de la unua atombombo. Sur la monumento estas gravuritaj la nomoj de la 2.282 postvivintoj de Hiroŝima, kiuj mortis en 1976 sekve de la radiadoj.

Dum la ceremonio, s-ro Shirley Amerasinghe (Sri Lanko), unua prezidanto de la Asambleo de UN, partoprenanta tiun jaran manifestacion, kvalifikis kiel "malindan abomenon de la XX-jarcenta teknologio" - la tragedion de Hiroŝima kaj tiun de Nagasaki. Li poste kondamnis tiun novan "satanan" inventon, "la lastan honoron kiun konsistigas la "neŭtronbombo"...

Kaj li petis al "la nacioj de la tuta mondo esplori kaj realigi - ĉiujn rimedojn por elimini la militkaŭzojn".

La usona registaro per tiu abomenega armilo riskas relanĉi la vetermadon, kaj devas renkonti la rezolutecon de la popoloj, inkluzive de la usona, ĝis la honto ne plu estos tolerebla kaj tiam la usona registaro devos veni al pli saĝa politiko.

Manifestacioj komencis organiziĝi en Aŭstralio, FRG, Usono, ktp... La centra komitato de la ekumena konsilio dum sia jara sesio sin deklaris "profunde maltrankvila pro la fabrikado de novaj tipoj de nukleaj armiloj". Protestoj ekflugas el multaj lokoj...

La vivo de la homaro, de niaj idoj, la ekzistado mem de la Mondo povas esti tutsimple neigita! Oni ne havu iluziojn: la imperiistoj - ne nur volas esti "la plej fortaj", ili timas la ideojn de libereco, suvereneco, socia justeco, kiuj evidente minacas iliajn privilegiojn, kaj ili revas posedi la Superregan Armlon por eventuale fereigi ĉion kio ĝenas ilin.

La batalo kontraŭ la neŭtronbombo situigas en la kadro de la Alvoko de Varsovio kaj fariĝas unu el la urĝaj taskoj de la pacamaj popoloj.

Ni turnas nin al ĉiuj MEM-anoj, al ĉiuj MEM-sekcioj, al ĉiuj esperantistoj kaj al ĉiuj aliaj organizoj senescepte kun jena petego:

Protestu al la usonaj ambasadoj, partoprenu la agadojn samcelajn de diversaj organizoj en via urbo, aŭ lando! La afero gravegas kaj estas urĝega! La momento venis por agi unuece kun ĉiuj homoj, organizoj kaj registaroj, kiuj batalas por malmarmado. La paco dependas de la popoloj, kaj do ankaŭ de ni, esperantistoj!

LA ANGLA LINGVO: IO PLI OL LINGVO

Oni povas konstati hodiaŭ ĉe ni, kaj ne nur ĉe ni sed ankaŭ eksterlande, en ampleksaj teritoriaj sektoroj de Eŭropo, ke oni disvastigas kun granda forto kaj kun plena akceptado la uzon de la angla lingvo en diversaj kampoj: teknologio, kuracado, komerco en la moderna muziko, turismo kaj aliaj.

Ce ni iom post iom estas plej granda la nombro de personoj kiuj interesiĝas pri la lernado de angla lingvo por diversaj celoj, iom post iom oni vidas surstrate pli da grandajn standardojn oni kutimas kunporti ĝin en la pantalonoj, jakoj aŭ similaj vestaĵoj sed ili ankaŭ aperas en la komercaj montrofenestroj kie ili vokas la atenton de kiuj simpatias kun ĝi. Oni devas konstati, ke almenaŭ ĝis nun, tio okazis nur kun la koloroj de tre konkreta standardo... ĉar la aliaj koloroj, ĝenerale ne multe simpatias, eble ĉar ne interesas ke ili estu simpatiaj.

Io simila okazas kun moderna muziko, iom post iom, estas pli da anglaj sondiskojoj en la komercoj ĉar oni bone vendas ilin, kompreneble, kaj ankaŭ estas hispanaj kantistoj kiu kantas por hispanio - ankaŭ angle.

Kompreneble ĉi-tio okazas ne nur pro tio, ke la angla standardo estas bela, kaj la angla muziko ankaŭ estas bela kaj interesa, ĉar se estus nur tiu ĉi kialo, ĉar oni intencas kovi en kelkaj popoloj, kiuj kiel ĉiuj popoloj havas sian propran kulturon kaj historion, konkretan ideologion.

Ideologion malutilan por tiuj popoloj ĉar estas importita ideologio el alia lando kiu havas aliajn ekonomiajn kaj politikajn kondiĉojn malsamajn al tiuj de nia lando.

Tiu ĉi ideologia manipulado, kiu entenas inter aliaj kulturon, precipe estas kunligita al la ekonomiaj interesoj de la grandaj kapitaloj, eble internaciaj. (bedaŭrinde la kolonialismo ankoraŭ ne mortis).

Jes, hodiaŭ estas realo, ke oni devas koni la anglan lingvon ĉar oni bezonas koni ĝin, pro tio ke estas multaj libroj verkitaĵoj en angla lingvo pri diversaj aferoj: tekniko, medicino, scienc'aj revuoj k.t.p. Sed estas danĝera realo, rezulte de tio la teknologio ankaŭ estas angla, tio signifas, ke estas teknologio adekvata al aliaj ekonomiaj rimedoj kaj aliaj sistemoj de produktado kiuj ne troviĝas en la samaj kondiĉoj de nia lando.

Kia utilo havas ĉe ni tiun grandan aŭtomobilon kiu bezonas la duonon de la salajro por ekfunkcii, kaj por tiu oni devas serĉi la adekvantan landvojon por ke ĝi povu rapidigi laŭ siaj adekvataj teknikaj kondiĉoj, sciante ke oni ne povas trapasi la rapideclimon de 100 Km. po horo ĉar ĉe ni **havas energiajn problemojn?**

Kial ni uzos ĉe ni la modernajn sistemojn de produktado, kiuj grandigas la nombron da homoj sen laboro, por tiamaniere, atingi - plej malmultekostajn laboristojn por la entrepenoj, kies kapitalo, plej ofte estas eksterlanda.

Oni devas, do konstati, ke la angla lingvo havas gravan rolon ĉe ni, tial ke ĝi ne nur estas lingvo sed, ilo por enigi ideologion laŭ konvena ekonomia situacio, kaj se nun estas la angla kiu ludas

tiun rolon, pro tio ke usono estas grava potenco, eble en alia tempo estos alia nacilingvo.

La angla lingvo ne estas la internacia lingvo kaj malgraŭ tio neniam povos esti ĝi

Neniu nacilingvo, povos esti internacilingvo, ĉar ĝi kumpor-
tas sian propran kulturon, historion, k.t.p. kiuj ne estas inter-
naciaj kaj pro tio ke internacismo komencas respektante la diver-
sajn naciojn kun siaj konsekvencoj kaj tute ne por helpi la ek-
nomiajn interesojn de iu lando.

JOAN RAMONEDA

Sabadell



KOTIZOJ POR 1978

La kotizoj ĉi-jaraj estas jenaj:

Membroj (malpli ol 30 jaroj) 250,- ptoj
Apogantoj (pli ol 30 jaroj) 400,- ptoj
Abonantoj (eksterlandanoj kaj grupoj) .. 400,- ptoj

Bonvolu pagi per poŝta ĝiro al HEJS, Apartat 407, SABADELL.

Ne pagu tra banko, ĉar la kostoj estas tre altaj kaj ni ricevus vian kotizon one formanĝitan de la banko.

Se vi ankoraŭ ne faris tion, indiku vian naskiĝdaton!!!. Dankon.

KONGRESU!

34a INTERNACIA JUNULARA KONGRESO DE TEJO - VELIKO TIRNOVO

63a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO - VARNA

51a KONGRESO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA - LECTOURE

KAJ TIEL PLU

MALFERMATAJ PARDOJ EN LA TUTA MONDO

Ekde antaŭ multaj jaroj, la homoj disiĝis iom post iom. Ekaperis la militoj. La popoloj, per landlimoj, kontraŭmetiĝis. Tuje, organizo kaj movado proponiĝis krei unigitajn kaj ekkonantajn pardojn. La propalantaj lingvoj estas la limo kiu ESPERANTO kontribuas forigi sed ekzistas aliajn problemojn.

SERVAS estas internacia movado kiu, same kiel Esperanto, intencas fortikigi la interpopolan komunikadon super la pluraj limoj, lingvoj kaj naciecoj. SERVAS naskiĝis en 1949, kiam la konsekvencoj de la - lasta granda milito estis ankoraŭ ĵusaj. En la Alta Popola Lernejo de Askov (Danlando), viroj kaj virinoj el la tuta mondo unigitaj por studi pri la paco kaj la kulturo, ekideigis novan pordmalfermantan sistemon por laborstudaj vojaĝoj.

Baze, ĝi estas organizo dank'al kiu la inskribitaj vojaĝantoj povas ricevi listojn de gastigantoj el ĉiuj landoj kaj komuniki al tiu kun-deziros viziti. Laŭ la akceptitaj normoj, la vojaĝantoj povas resti dum limigita tempo (du aŭ tri tagoj) escepte kiam la gastiganto volonte invitas lin por ke li restu pli da tempo. Dum la restado, la gastiganto partoprenas la heĝman vivadon, konversacias, kunvivadas, k.t.p. kun la gastiganto. En 1952 tiu movado prenis el Esperanto la aktualan nomon SERVAS, por montri la servistan karakteron por la monda paco. Tra la pasoj de la tempo, kio komencis kiel malgranda movado en du aŭ tri eŭropaj landoj alvenis al aktuala situacio; miloj da personoj en 62 landoj.

SERVAS funkcias simple; ĉiu nacia komitato eldonas ĉiunjaron listojn de gastigantoj, kiuj estas sendataj al la ceteraj landoj de la kontinentaj kunordigantoj. En tiu listo estas ĉiu gastiganto kun siaj informeroj; nomo, adreso, telefono, kvanto da personoj kiujn li povas ricevi, metio, aĝo, lingvoj kiujn li parolas, k.t.p., kaj emoj, tio-ĉi estas speciale grava por renkonti la plej taŭgan. Ĉiokaze, ĉiam ekzistas unu aĝo komuna, almenaŭ; esti SERVASano, kaj tio sufiĉas.

La SERVASvojaĝantoj petas alla nacia kunordiganta komitato la listojn de la landoj kiujn ili deziras viziti. Por ĝi ili devas pagi 200 pesetojn por subteni la elspezojn de la komitato, listfarado, ... Posedante la liston, la vojaĝantoj elektas la gastigantojn kaj kontaktas ilin letere, aŭ telefone, kelkajn tagojn antaŭ sia alveno. Ĉiu vojaĝanto kunportas prezentigan leteron subskribita de la nacia kunordiganto, por eviti la problemojn devenantajn el ebla fremdaj personoj kun malSERVASaj ideoj. Tio sekurigas la gastiganton.

La kulturaj kaj homarecaj bonajoj devenantaj el tiuj kontaktoj estas facile kompreneblaj. Ĉiu esperantisto jam partopreninta iun internacian kongreson, konas ilin tre bone. La ebleco renkonti en la tuta mondo personojn kun kiuj povu komuniki, kurvivi, kunloĝi, helpi, interamikiĝi, estas gravaj faktoroj. Multfoje ni estas en nekonsento la ko kaj ni bezonas informojn kaj, tamen, profiti ĉiun momenton. Tiam, iu SERVASano povas helpi nin.

La ekonomia afero ne estas multe grava, Dank' al SERVAS, vi povas gastiĝi senpage en ĉiuj eksterlandaj urboj (ankaŭ en Hispanio, kompreneble).

Por ĉio tio servas SERVAS. Tiu estas la kaŭzo dank' al kiu ĉiu post iom multaj personoj vojaĝas tiel tra la mondo, kaj ankaŭ plimultiĝas - la nombro de gastigantoj, ĉar ricevi de tempo al tempo vizitantojn el aliaj landoj estas alloga kaj ne multekosta.

SERVAS partoprenis multajn internacian konferencojn kaj kongresojn kaj estas agnoskata de ONU kiel organizo konsulta ne registara. Ĝi estas kontrolata en Svislando kaj posedas konstantan reprezentacion en la sidejo de ONU. Servas havas prezidanton elektatan ĉiu 4 jaroj kaj kunigantojn en ĉiu kontinento (nun loĝantaj en Germanio, Japanio, Meksikio, Kenio kaj Aŭstralio). Same ekzistas eldona grupo (en USONO nun) kaj sekretariato por la paco (en Anglio).

Nun, en Hispanio, ankoraŭ estas malmultaj SERVASanoj sed iom post iom ili plikreskas. Ni scias ke estas multaj personoj kiuj havas similajn ideojn kiel ni kaj pro tio ni deziras ilin diskonigi al ili. La esperanta movado havas koincidajn celojn. Laŭ tio SERVAS povas esti bona komplemento por ĉiu esperantisto kiu vojaĝos aŭ deziras ricevi hejme eksterlandanojn (aŭ samlandanojn). Similmaniere, la SERVASanoj kiuj ankoraŭ ne konas Esperanton povas profiti ĉi-tiun lingvon kaj sian organizon por plikonigi liajn eblecojn. Krome, en la SERVAS-listoj el multaj landoj ekzistas membroj jam esperantistaj (ankaŭ en Hispanio).

Ekde ĉi tiuj alineoj ni alvokas kiuj sentigas identiĝintaj kun SERVAS, por ke ili kontaktu nin. Sendu viajn leterojn al: Apartado 3092- Madrid.

Jaime Lucio Martín Pérez

Sekretario de SERVAS-Hispanio Madrid



Laŭ ordonas la 24an artikolon de la leĝo 14/66 pri Gazetaro kaj Presado, ni publikigas ke HEJS estas dumonata informa ĉifteno por ĉiuj membroj de HEJS, ne havanta akciulojn nek iu ajn administran partoprenon, kaj ĝiajn kostojn estas pagitaj de HEJS. Prezidanto de HEJS: Ludoviko de Yzaguirre. Redaktoro de HEJS: Oscar Puig.

tejo

ESTAS JUNA
ESTAS VIGLA
ESTAS NIA
BEZONAS VIN

PARTOPRENINDA

Veliko Târnovo - unu el la plej belaj urboj en Bulgario, altiras multajn turistojn pri sia unika situo kaj glora pasinteco. La ĉefurbo de la Dua Bulgara Ŝtato /1186-1393/ daŭrigis sian intensan vivon dum la bulgara Renesanco.

Ĝi estas unu el la centroj de la nacia liberiga batalo kontraŭ la turka jugo. La urbo kunigas sian faman gloron kun la gloro de la nuntempa Veliko Târnovo - mirinde bela kaj grava kultura kaj industria centro de Bulgario.

Ĝi atendas la vigan E-junularon dum la 22-29. VII. 1978 en la 34-a Kongreso de TEJO, sub la alta aŭspicio de Ljudmila Jivkova - Prezidanto de la Komitato de Kulturo

La kongresejo funkcias en la aŭlo kaj la aŭditorioj de la Universitato "Kiril kaj Metodi", bele situanta sur la historia monteto "Sveta Gora". La kongresanoj, kiuj aliĝos pli frue, loĝos en la nova studenta domo ĉe la Universitato. La aliaj estos loĝigitaj en la urbon. Dum la 63 Universala kongreso en urbo Varna, LKK certigos loĝejon por partoprenantoj en la junulara kongreso. kiuj ne havos eblecon aliĝi al UEA-kongreso. Oni loĝos en la regiono de la ripozejo "Oraj Sabloj". La limigita nombro jam plene elĉerpiĝis.

LA KONGRESA PROGRAMO

La solena inaŭguro okazos la 23-an de julio antaŭtagmeze.

La ĉeftemo de la 34-a LK estas "Esperanto kaj Interjunulara Amikeco". En la ejoj de la universitato "Kiril kaj Metodi" kunsidos la Komitato de TEJO kaj funkcios laborgrupoj, kiuj pritraktos la ĉeftemajn kaj aktualajn junularajn temojn. La dezirantoj gvidi laborgrupon, bonvolu anticipie anonci sin al LKK.

Dum la urboekskurso la kongresanoj konatiĝos kun la historiaj kaj kulturaj vidindaĵoj de Veliko Târnovo, ekonos ties gloran pasintecon kaj prosperan nuntempon.

Alia tutlaga ekskurso montros la belegan ĉirkaŭaĵon.

Bulgara Vespero. Ĝi estos impona kaj brila artarangĝo. Estos prezentita riĉega programo el dancoj kaj kantoj de la bulgara popolo.

La Internacia Vespero estos bela arangĝo, dum kiu elpaŝos talentoj inter la Kongresanoj. La dezirantoj partopreni estas petataj prepariĝi kaj anticipie kontakti kun LKK.

La programo antaŭvidas du teatrajn prezentojn (Bulgara Esperanto - Teatro kaj pup teatro), malfermo de foto kaj etnografia ekspozicioj, sporta festo k. a. Vespere funkcios diskoklubo ĉe la Universitato.

La Kongreso finiĝos per Konkluda Forumo kaj Adiaŭa Vespero.



34a

IJK

El la Dua Bulteno, far la LKK de la 34a IJK

INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

18-A ALVOKO

Dezirante reokazigi la glorajn INTERNACIAJN FLORAJN LUDOJN, kiuj tiel sole okazadis 17-foje en diversaj urboj de Katalunujo, la Kataluna Kunordiga Komitato de la Hispana Esperanto-Federacio invitas, post 42-jara ĉeso, la esperantistajn poetojn kaj prozistojn ĉiulandajn konkuri noble per siaj verkoj en tiu tradicia Beletra Festo kiu, en la trobadora epoko, estiĝis en Tuluzo (Okcitanujo) kaj poste firme enradikiĝis en Katalunujo, kie ankoraŭ nun ĝi vigle persistas, kaj kie unuafoje ĝi eniris en la Esperantan Movadon kiel brila programero de la 5-a Universala Kongreso de Esperanto en Barcelono.

Estos aljuĝitaj la jenaj PREMIOJ:

P O E Z I A B R A N Ĉ O

- 1.- NATURA FLORO, al la plej bona amapoemo.
(Maksimume 80-versa)
- 2.- JASMENO, al la plej bona priesperantisma poemo
(Maksimume 80-versa)
- 3.- VIOLO, al la plej bona humanisma aŭ etika poemo (Maksimume 80-versa)

P R O Z A B R A N Ĉ O

PREMIO AL plej bona prozaĵo-rakonto, novelo, eseto.

(Maksimume 2000-3000 vorta)

T R A D U K I B R A N Ĉ O

Traduki el la kataluna la noveleton verkitan de Pere Calders "O ell, o jo", kiu troviĝas, i.a., en la libro "Cròniques de la veritat oculta" (Biblioteca Selecta volumo n^o 170)

Tiu kiu deziras havigi al si la tekston, bonvolu peti ĝin al S-ro Salvador Aragay, str. Bassegoda, 40, 3-1 Barcelona-28

La Juĝkomisiono aljuĝos, se eble subpremiojn. Ĉiu konkursanto bonvolu atentigi la jenan

R E G U L A R O N

- 1.- La verkojn oni sendu, po 4 ekzempleroj nepre tajpitajn je duobla interŝpaco, nur ĝis la 31-a de junio nun jara laŭ la poŝtstampo, al jenaj nomoj kaj adreso de la Sekretario: Gabriel Mora i Arana, str. Carri65, 4, ANNESA (Barcelona) Hispanujo.
- 2.- Ne rajtas konkursi tiuj verkoj antaŭe premiitaj aŭ publikigitaj.
- 3.- La aŭtoroj ne devas subskribi siajn konkursaĵojn, sed krom la titolo ili devas skribi specifan moton aŭ devizon
Ili enmetu slipon kun siaj nomoj kaj adreso en apartan fermitan koverton nur kiu estu skribita la titolo, moto aŭ devizo kaj la elektita branĉo.
- 4.- Kvankam oni devas konsideri ke ĉiu aljuĝota premio estas, esence, honora, ĉiu gajninto ricevos krom Diplomo, valoran Esperantan libron aŭ donacon, laŭ ebleco.
- 5.- La Sekretario antaŭsciigos al la ĵus premiitoj la verdikon por ke ili povu ĉeesti la Feston, aŭ male, elekti siajn anstataŭantojn (precipe a gajninto de la Natura Floro)
- 6.- La gajninto de la NF simbolo oferuonos ĝin al la Reĝino de la poetoj.





NIJ SCIENCULOJ
KREDAS KE, POST ILIA MALV-
ENKO, ILI RETROIRIS PLI EN
SIAN PRIMITIVECON; SED MI
PENSAS KE ILI ESTAS TRE
INTELIGENTAJ.



NU, KNABO,
ĜAJNAS KE LI
MALAPERIS.



EBLE, LI
RIFUGIS EN
SIA NESTAĈO,
ATENDANTE
KE NI...



SERĜENTO!

FORIR...

AAAHH!

CRUNCH!

TRA LA MONDO

buenos aires wien
praha paris
milano baghdad
tananarive gdansk
sundwall basel
caracas tohio

leicester sofia
berlin haifa
sarajevo seoul
puerto rico açores
santa barbara
saigon geneve

... SENPAGE !?

*

Disponigas kontraŭ 10 FF aŭ 8 Internaciaj respondkuponoj liston de 240 esperantistoj ĉe kluj, en 40 landoj, vi povas senpage tranokti

J.M.CASH, 9 rue du Languedoc,
F 78690 Les Essarts-le-Roi (Francio)
(pĉk. 25426-58 Paris)

Se vi deziras mem akcepti gastojn, sendu vian nomon kaj adreson antaŭ la 31 de januaro, kaj vi ricevos senpage en februaro la novan liston kun via adreso enpresita.

pasporta servo

gastiga servo de tutmonda esperantista junulara organizo